

# L Esperero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

APRIL-MAJ 1980  
68-A JARKOLEKTO

3

ISSN 0014-0694  
FONDITA EN 1913

## Skapar möjligheter

Vi har skrivit en hel del om själva kongressen, dess program och utflykter, men inte berört andra arrangemang och detaljer som bidrar till att berika kongressen. Två sådana arrangemang är lite vid sidan om, även om de nästan räknas till själva kongressen. Vi tänker här på de blindas kongress och barnkongressen.

De blinda esperantisterna kommer, helt traditionsenligt att förlägga sin årliga kongress i anslutning till den stora internationella kongressen. I år kommer de att vistas på Bosön, där de kommer att ha ett eget program med föredrag, studiebesök mm. Dessutom kommer de att delta på den internationella kongressen.

### BARNENS KONGRESS

Esperantotalande barn i åldern 6 till 13 år kommer att ha en egen "barnkongress". Namnet är lite felaktigt, eftersom det rör sig om en lägerskola. Barnen kommer att vistas i Röda korsets barnby "Elvskogen" i Västerhaninge, ca 30 km söder om Stockholm. Byn består av småstugor, i vilka 4-6 barn får plats. Totalt är man beredd att ta emot 50 barn.

Ävsikten med "barnkongressen" är att ge barn, som redan talar esperanto, möjlighet att använda sig av språket på ett naturligt sätt, att skaffa sig vänner från olika länder och på så sätt



öka deras förståelse för alla handa kulturer och folk.

Barnen kommer till "barnkongressen" från olika länder; samma gäller ledarna som kommer att finnas på plats.

Vistelsen är starkt subventionerad med bidrag från "den stora" kongressen, utbildningsdepartementet och (hoppas man) från olika företag. För en hel vecka behöver man betala 200 kronor, vilka täcker mat, logi, utflykter och olika material.

Från den internationella kongressen helt fristående, även om geografiskt närliggande, är de kristna esperantisternas kongress i Södertälje och ungdomskongressen i Rauma, Finland.

### ATT SKAPA MÖJLIGHETER

Men kongressen har inte bara till uppgift att ordna möten och utflykter, utan också att skapa möjligheter av olika slag. Möjligheter på det mänskliga planet,

förstås, att träffa andra, att skaffa vänner, att umgås helt enkelt. Men också möjligheten att se böcker på esperanto i verkligheten, att bläddra igenom dem innan man köper dem, att skaffa sig olika material som man inte känt till tidigare.

För att förverkliga denna möjlighet måste kongressen ha en väl fungerande bokförsäljning ordnad.

I Stockholm är det Esperantoförlaget som åtagit sig att ordna bokförsäljningen. En stor och bra lokal är redan ordnad i Folkets hus och två ansvariga har redan börjat beställa hem böcker till försäljning, Marianne Westman och Derk Dam från Stockholm. Man vill i första hand ha färska böcker i Stockholm, men även en del klassiker. Det kommer att bli fråga om flera hundra titlar från en mängd olika förlag, så nog blir det jobb för dem båda.

Förutom böcker kommer det att finnas en del gramofonskivor och en del kontorsmaterial, som i en

vanlig bokhandel. Esperantoförlaget tänker inför kongressen beställa en hel del nya saker, t ex pennor, mappar, bärkassar (att bära böckerna i), portföljer m m, allt med anknytning till esperanto.

LKK har för kongressens del beställt färgvykort med esperantotext. Det blir åtta stockholmsmotiv, samtliga tagna av Sven Samelius från Norrköping, den kända fotografen-esperantisten.

Trots den särskilda esperantotexten kommer korten att säljas till samma pris som i handeln.

Dessutom har man med posten ordnat en särskild stämpel, med kongressens symbol, som kommer att användas under hela kongressveckan. Den blir säkert populär hos alla samlare. En serie kommer att bestå av åtta stämplat med olika datum. Man tänker osökt på kopplingen åtta vykort — åtta olika stämplat. Varför inte ha olika datum på olika motiv som en trevlig överaskning till sina bästa vänner?

Sakta växer kongressen fram. Detalj på detalj beslutas, beställs, tas fram; allt måste finnas på plats i augusti, allt måste klaffa, alla berörda måste vara på det klara med sina uppgifter. Bara så vet man i förväg, att man undviker problem och onödiga frågor, irritation och gnäll. Det här ska bli en bra kongress. Något annat har vi inte tänkt oss heller.

## Aktivu en Stokholmo kaj igu aliajn aktivi!

"Vizitis nin en mia lernejo virino el Pollando, kiu prelegis en esperanto. Mi prenis broŝuron pri ĝi, ĉefe, ĉar mi tre interesiĝas pri lingvoj. Mi ĝis nun ne konceptis esperanton aliel ol kiel lingvon, sed post iom da legado pri ĝi mi opinias, ke la ideoj, sur kiuj la lingvo baziĝas estas tre gravaj, fakte pli gravaj ol la lingvo mem."

Tion skribis al SEF antaŭ nelonge iu, kiu cetere volis informi pri alia movado, en kiu ŝi aktivis kaj kiu, laŭ ŝi havas similajn celojn kiel ni esperantistoj. Sed ni iom pripensu ŝian enkondukon al la letero.

Homoj ekinteresiĝas pri esperanto pro diversaj kaŭzoj: kelkfoje tute praktikaj, aliffoje tute idealismaj. Okazas verŝajne malofte, ke oni ekinteresiĝas pri esperanto pro pure ideologiaj motivoj. Sed sen ideologia motivo oni malofte longe restas aktiva en la esperantomovado.

Lingvo estas portanto de ideoj, kia ajn lingvo, do ankaŭ esperanto. Kaj la ideoj malantaŭ esperanto estas ideoj pri egaleco, pri paco, pri manko de diskriminacioj. Se ni interesiĝas pri esperanto, ni ankaŭ interesiĝas pri tiuj ideoj. Nia interesiĝo ne rajtas resti nur sur la teoria plano; ni devas interesiĝi pri ili ankaŭ praktike. Ni havos ĉijare vere bonan okazon montri nian interesiĝon kaj partoprenon dum la Universala Kongreso. La kongresa temo ĉijara estas ĝuste **Diskriminacio**. Ni diskutu tiun temon, ĉar ĝi estas tre intime ligita kun la ideoj, kiuj pravigis kaj naskis esperanton.

La temo **Diskriminacio** montriĝos dum la kongreso en multaj formoj. Unu estos unupersona teatraĵo de Jadwiga Gibczyńska, *Rememoro*, kiu temas pri Zamenhof kaj lia agado kontraŭ diskriminacioj diversspecaj; alia ebleco estos aŭskultado de prelegoj pri la kongresa temo. Sed plej gravos via partopreno en la diskutgrupoj pri la temo: tie vi povos diri vian opinion, preparoli viajn spertojn. Kaj tio multe pli gravas ol pasiva aŭskultado. Esperanto kaj la ideoj malantaŭ esperanto ne estas afero de kelkaj unuopaj spertuloj: ili estas afero de ni ĉiuj, kiuj parolas la lingvon. Tial vi aktivu dum ĉi tiu kongreso. Via opinio kaj viaj spertoj estas gravaj por ĉiuj aliaj. Aktivu mem kaj igu ĉiujn aliajn aktivi!

**Franko Luin**

## Vänortsverksamhet: något för en esp-klubb

Från Västerås Esperantoklubb ha *La Espero* fått följande rapport. Eftersom det som står i rapporten kan vara av intresse för andra klubbar, tar vi med den *in extenso*, som det heter, trots sin längd. Ordet är VEKs:

"Vi i Västerås Esperantoklubb 'halkade' av en händelse in i vänortsverksamheten, och det har visat sig vara en väldigt intressant och givande 'marknad' för esperanto. Därför vill vi gärna dela med oss av våra erfarenheter och kanske ge andra klubbar i landet en idé till att starta någon liknande verksamhet.

Många orter i landet har ju vänorter i andra länder och tanken med dessa är att befrämja utbyte av erfarenheter på många olika områden samt bidra till ökad förståelse mellan folken.

Från VEKs sida hade till helt nyligen kontakt praktiskt taget bara ägt rum med esperantisterna i vår finska vänort Lahti. Västerås kommun däremot har länge haft relativt intensiva förbindelser med Kassel, Västerås' vänort i Västtyskland. Förra våren var ungdomsledare från Kassel på besök i Västerås och besökte de olika föreningarna anslutna till Västerås Föreningsråd (kommunens 'paraplyorganisation' för Västerås' föreningar), däribland VEK.

Reaktionen från vår sida blev den 'gamla vanliga': oh, alla dessa tolkar som jämt måste vara med! Och det är de ju, vid de officiella mottagningarna. Spontana

kontakter, utanför programmet, hämnas ju av att det där oftast inte finns tolkar till hands.

Även dessa västtyska ungdomsledare var medvetna om det här problemet och tyckte vid sitt besök hos oss att esperanto var en fin idé. Men i Kassel fanns ingen esperantoklubb som kunde agera och därmed var det stopp.

### NY KLUBB I KASSEL

Tills i höstas, då vi fick reda på att det startats en esperantokurs i Kassel för ett tiotal deltagare. I november bildade de en esperantoklubb, vars ledare är en tjänsteman i Kassels förvaltning. De tog omedelbart kontakt med VEK och det blev livliga kontakter redan från början. En av många idéer som den här gruppen har är att 1981, i samband med en internationell trädgårdsutställning, inbjuda representanter från alla sina vänorter och att alla samtal ska föras på esperanto.

Det blev alltså en väldigt fin anledning för oss att intensifiera våra ansträngningar för att få Västerås kommun att få upp ögonen för esperanto. Vad vi i år hittills gjort är att vi skrivit en artikel i tidningen *Forum för fritid* (utgiven av Västerås kommuns kultur- och fritidsförvaltning) om vad som är på gång i Kassel. Dessutom inbjöd vi kommunfullmäktiges ordförande till invigningen av *Internationella vänskapens vecka*. När han hade accepterat detta, skrev vi till

### Esperantoförbundet

Postadress: Box 4009, 122 04 Stockholm-Enskede ★ Besöksadress: Hågervägen 31 (T-station Tallkrogen) ★ Telefon: 08-48 99 76 ★ Förbundets expedition har öppet tisdagar kl. 18 — 20 ★ Postgiro: 20 12-3 ★ Medlemsavgift: direktansluten medlem 50 kronor, ungdomsmedlem under 26 år 25 kronor, familjemedlem (utan tidning) 15 kronor ★ Prenumerationsavgift för *La Espero* och *Esperantonytt* ingår i medlemsavgiften ★ Medlemmar under 30 år får dessutom ungdomsförbundet SEJUs blad *ktp*

### La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet ★ Adress: Box 4009, 122 04 Stockholm-Enskede ★ Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg ★ Redaktör: Franko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,

telefon hem 08-712 8291 ★ I redaktionen: Sven Alexandersson, Åke Blomberg, Anita Lindblom ★ Prenumeration: 40 kronor per år, postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet ★ Tidningen utkommer med åtta nummer per år: i februari, mars, april, juni, september, oktober, november och december ★ Manusstopp: den 10, månaden före utgivningsmånaden ★ Fotosats: Esperantoförbundet ★ Tryck: Sturetryckeriet AB, Stockholm 1980

### Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö ★ Besöksadress: Möllevångsgatan 20 B ★ Öppettider: 1 sept — 15 maj: onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17 — 18 ★ Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren ★ Telefon: 040-12 20 29 ★ Postgiro: 578-5 ★ Expedition: Anna-Greta Ströme ★ Medhjälpare: Wivi Nilsson ★ Styrelsens ordförande: Åke Blomberg

esperantoklubbarna i Lah-  
ti, Kassel och Akureyri (vår  
vänort på Island) och bad  
dem att hjälpa oss med  
officiella hälsningar från  
sina kommunrepresentan-  
ter. Från Finland hälsade  
vänortskommitténs ordför-  
ande, från Island en kom-  
munrepresentant som delta-  
git i vänortsarrangemang  
och där upplevt de språk-  
svårigheter som råder även  
i Norden, och från Kassel  
hälsade överborgmästaren i  
ett långt och entusiastiskt  
brev. Samtliga hälsningar  
var skrivna på esperanto,  
vilket gjorde ett synbart  
intryck på 'högade vederbör-  
ande'.

#### ARBETA INIFRÅN

Nu närmast väntar oss att  
ta mer aktiv del i Västerås  
Föreningsråds verksamhet,  
för att arbeta mer inifrån.  
Vi ska även följa upp de  
kontakter vi har med vän-  
ortskommittén för att försö-  
ka få fler vänorter till  
Västerås: Maastricht i Hol-  
land har varit på tal och det  
skulle passa oss bra, för vi  
vet att det finns aktiva  
esperantister där ... Vi hop-  
pas också på en vidareut-  
veckling av ovannämnda  
agerande, där vi kan få  
esperantisterna i våra vän-  
orter att hjälpa oss påverka  
våra politiker."

Gunilla Sundholm

## Projektgrupp bildad: Espro-80 snart igång

**EspEko**, som är en förkort-  
ning med betydelsen  
"Esperantorörelsens konfe-  
rens om ekonomisk verk-  
samhet" har gett upphov till  
en annan förkortning:  
**Espro-80**, där "esp" står  
för esperanto och "pro" för  
projekt. Det är fortfarande  
fråga om samma idéer, bara  
det att de kommit ett steg  
vidare.

Under mars har några  
representanter för Esperan-  
toförbundets styrelse och  
för Esperantoförbundet träf-  
fats i enlighet med konfe-  
rensens förslag och diskute-  
rat vilka vidare åtgärder  
som måste tas. Om ett var  
alla eniga, nämligen att vi  
inte kan sätta igång något  
nytt innan årets internatio-  
nella kongress är avklarad.

Man vill inte ta några  
risker, åtminstone inte ris-  
ker som kan förutses. Där-  
för måste den verksamhet  
eller de verksamheter som  
man kommer att besluta sig  
för studeras noggrant. Föl-  
jande punkter har man satt  
upp:

- ★ val av lämpligaste för-  
stahandsverksamhet; kal-  
kyler
- ★ lokalbehov och lokalise-  
ring; kostnadskalkyl
- ★ investeringsbehov; ma-  
skiner — lager
- ★ personalbehov; kost-  
nadskalkyl
- ★ lagar och förordningar  
att ta hänsyn till
- ★ tidplaner; andrahands-  
verksamhet.

Espro-80 ska leda till

# För dig

#### KARA DIABLINO

Roman av D. P. Boatman. "Oni legas unospire  
... romantika, krima, mistera ..." 112 sidor,  
vackert plastband. Med moms kr 36,—

#### KUMEUAUA, FILO DE LA ĜANGALO

av Tibor Sekelj. Rikt illustrerad med teckningar.  
"Ĝuinda verketo pri indiana knabo ... freŝe verva  
lingvaĵo..." 95 sidor, vackert plastband. Med  
moms kr 30,—

#### MERLO SUR MENHIRO

av Albert Goodheir. Andra utgåvan med nya  
dikter. Illustrerad med teckningar. "Tra la verko  
ekbrilas originalecaj sparkoj ..." 93 sidor,  
vackert plastband. Med moms kr 40,—

#### ESPERANTO-RUSA VORTARO

av E A Bokarev. 26 000 ord. 488 sidor, inbunden.  
Med moms kr 36,—

#### LA NOBLA KORANO

nr 10 i serien Oriento-Okcidento. Översatt från  
arabiskan av dr I. Chiussi, med parallell text på  
arabiska och esperanto. 654 sidor, svart skinn-  
band, finns nu åter i begränsat antal. Med moms  
kr 118,—

#### ESPERANTOFÖRLAGET

Box 7502, 200 42 Malmö, postgiro 578-5


Andelsägarna i Förlagsföreningen Espe-  
ranto kallas härmed till ordinarie års-  
stämma i Hallsberg lördagen den 17 maj  
1980.

Ärenden enligt stadgarna, §14.

Verksamhetsberättelse med ekonomisk  
rapport kommer att finnas vid stämman.  
Den kan även rekvireras från Esperanto-  
förlaget, Box 7502, 200 42 Malmö.

## ESPRO '80

### PROJEKTPLAN



Så diskussionen kom att  
cirkla en hel del om vad som  
ändå kan göras före hösten.

Ganska snart beslutades  
om att en projektgrupp bil-  
das, bestående av tre perso-  
ner: Franko Luin, Tyresö,  
Anita Lindblom, Kista, och  
Roland Lindblom, Ösmo.  
Denna projektgrupp styrs  
av en styrgrupp, i vilken  
SEFs och Förlagets styrel-  
ser ingår. I en ruta här intill  
skissas vad projektgruppen  
har att rätta sig efter. Trots  
att projektet fått namnet  
"Espro-80" kommer genom-  
förandet av projektet med  
all säkerhet inte att bli klart  
förrän en bit in på nästa år.

bildandet av ett seriöst  
arbetande ekonomiskt före-  
tag inom ramen för Esperan-  
toförbundet. Det ska kunna  
tjäna hela esperantorörel-  
sen i Sverige och lämna  
underlag för en expansion  
på medlemssidan. Att tjäna  
pengar (vilket man vill med  
detta) blir inget självändamål;  
verksamheten ska kunna  
ge bidrag (i vilken form  
blir också en fråga som  
måste diskuteras) för ökan-  
de esperantoarbete.

Det kommer att behövas  
stöd från alla esperantister i  
Sverige för att få projektet i  
gång och driva det fram-  
gångsrikt.

## Dek proponoj al SEF diskutotaj en Hallsberg

Dek estas la proponoj, kiuj direktas sin al la jarkunveno de SEF en Hallsberg. Duono el ili estas de estraranoj, kiuj ŝajne volas ricevi la apogon de la jarkongreso por siaj ideoj.

La unua propono venas de *Ulla Luin*, kiu volas instigi la svedajn partoprenantojn ĉe la Universala Kongreso en Stokholmo partopreni aktive en la diskutoj de tiu kongreso — admono bezonata, ĉar mankas tradicio pri vere vasta pridiskuto de la kongresa temo dum la UK.

La *Klubo de Jönköping* venas kun tri proponoj. En unu ili admonas la estraron de SEF aktive labori por eldonado de teknika literaturo en esperanto — demando jam pli frue vekita de la esperantistoj en Irano, kiu sentas tre grandan mankon sur tiu kampo. Tio estas verŝajne demando, kiun oni devos solvi je internacia nivelo.

La dua propono el *Jönköping* estas ripeto de la pasintjara propono pri matrikulo kun adresaro de la membroj. Eble ĉijare ĝi atingos pli bonan rezulton.

Per la tria propono la klubo pledas por iom da koloro sur la kovrilpaĝo de *La Espero*. La redaktoro volonte subtenus tiun proponon, sed li scias, ke iom da koloro signifus unu numeron de la gazeto malpli po jaro. Eble la demando solviĝos kiam realiĝos la projekto pri propra presejo.

*Franko Luin* sentas bezonon de ia "Instituto pri internacia komunikado", kiu, en kadre de SEF kolektu esplortaskojn rilatajn al esperanto kaj ĝia rolo en internacia komunikado, informu pri ili al la akademio mondo kaj influu al ĝi esplori similajn demandojn. La propono certe tuŝas gravan laborkampon, sed kiu faru la laboron?

*Lennart Åberg* opinias, ke Sveda Esperanto-Instituto bezonus esti pli aktiva, kiam oni planas plivastigon de la agado de SEF. Li supozas, ke la neaktiveco dependas de maltaŭgaj organizaj formoj kaj pro-

ponas, ke la membro-organizoj studu la gvidliniojn de la Instituto kaj eventuale prezentu proponon de nova organiza formo.

Ankaŭ iel pri la Instituto temas alia propono de *Franko Luin*. Temas pri mono, kiun la Instituto administras. Li proponas, ke SEF decidu, ke tiu mono estu uzata por eldono de svedesperanta vortaro. Similan decidon jam faris SLEA antaŭ kelkaj jaroj, kaj SIEF, la aliaj du membro-organizoj de SEI.

La *Esperanto-Societo de Hallsberg* interesiĝas pri televidaj kasedoj kiel informiloj kaj proponas, ke SEF produktu tian kasedon, kiu estu uzebla en informado, ĉefe en lernejoj. La demando estas tre aktuala, sed pri tiu ĉi oni povus same demandi: kiu faru la laboron?

Per tria propono *Franko Luin* atentigas, ke venontjare SEF kaj la kongresoj de SEF estos 75-jaraj kaj ke oni devus feste memori pri tio, ekzemple per pli longa kaj pli enhavoriĉa jarkunveno, kiu okazos en Malmö, kaj per invito al ĉiuj aliaj esperantoorganizoj en Svedio okazigi siajn kunvenojn samtempe en Malmö, tiel ke la komuna kongreso fariĝu vera manifestacio de la svedaj esperantistoj. Kion diras la malmöanoj pri tiu ideo?

*Åke Rohdin* volonte vidus pli da kunlaboro inter SEF kaj aliaj organizoj svedaj kun internaciismaj celoj. Oni povus kunlabori sur la ekonomia kampo, sed ankaŭ per organizo de komunaj informaj kampanjoj. Kun kelkaj el la menciitaj organizoj SEF jam sporade kunlaboras, sed certe eblus plivastigi la kunlaboron al aliaj, se iuj pretos gvidi tian agadon.

Kiel vi vidas, denove temas pri plivastigo de agado, sed restas la demando, kion la estraro kaj la jarkunveno diros pri tiuj ĉi proponoj. Kiel ĉiam temas pri limigita kvanto da aktivuloj kaj limigita kvanto da mono. Povas esti, ke kelkaj agadoj neniam realiĝos.


## 1979 normala jaro Malmulto elstaras

Jen denove okazo por mallonga resumo pri la agado de la svedaj esperantistoj dum la pasinta jaro. La jarraporto de SEF ĵus distribuiĝis al la kluboj. Trafoliumente la raporton oni ne povas trovi ion vere rimarkindan dum la jaro. La agado stabile disvolviĝas laŭ la modelo de la antaŭaj jaroj. La ekonomio ne kolapsas, ĉefe pro la donacoj de la membroj en *Klubo Cent* kaj parte pro la ŝtata subvencio al *La Espero*. Sed la evoluo al pli altaj kostoj kondukas al necesaj plialtigoj de la kotizo.

La jarraporto konstatas, ke SEF jam plenigis la lokalon, kie estas la oficejo, kaj ke pli vasta lokalo estus bezonata.

Dupaĝa listo pri la agado de la kluboj kompletigas la estraran raporton. Telegramstile oni ekscias pri kursoj, prelegoj, kunvenoj, ekspozicioj, informaj agadoj, pri kiuj oni ne pli frue sciis. Varias la agado kaj varias la interesiĝo de la kluboj. Oni povas trovi klubojn tre mafermitajn kaj kunlaborantaj kun ĉiuj eblaj instancoj, kaj aliajn, kies sola agado estas arango de kongversacia rondo. Oni faras laŭ sia kapablo kaj ne estas io malbona en tio.

Pluraj kluboj festis orajn jubileojn pasintjare: Hallsberg, Norrköping, Sundsvall, Göteborg. Ankaŭ tio estas signo de konstanteco kaj vicleco. Malaktivaj klu-



Malmulto okazis sur la kampo de informiloj; fakte nur unu produktiĝis dum 1979, nome "Man har sagt mig", kiu estis akceptita kun granda intereso.

Enketo inter la parlamentanoj printempe ne donis tre multajn respondojn, sed ĉar ili venis de konataj parlamentanoj, ni bonvenigis ilin.

La gazetaro kaj parte ankaŭ la radio dediĉis pli da atento al esperanto ol dum la antaŭaj jaroj, kiel jam konstatis Karl Gustafsson en sia trarigardo en *La Espero*.

Malkreski la kvanto de kursoj, kio montris sekvon en la kvanto de membroj, kiu ankaŭ malkreskis (per kvindek).

Cetera antaŭpreparo de la ĉijara Universala Kongreso estis parto de la pasintjara laboro.

boj ne atingas tian jubileon. Venontjare SEF festos sian 75-jaran jubileon. Malaktivaj organizoj ne atingas tian aĝon.

Kvin folioj por dek kronoj. Kvindek glumarkoj. Pri la venontjara Universala Kongreso en Stockholmo. Tri koloraj. Aĉetu multajn. Uzu ilin sur ĉiuj viaj poŝtaĵoj. Mendu per pago al la poŝtgiro 4 31 79 92-8, 65a Universala Kongreso de Esperanto.

## Ekkonu la verkiston de la fama "Aniara"

*Antaŭ unu jaro aperis la esperanta traduko de Aniara de Harry Martinson. Multaj jam intertempe sukcesis konatiĝi kun tiu majstroverko de la esperanta tradukarto — sed kion pri la aŭtoro? Kion vi scias pri li? Karl Söderberg helpas vin per la suba artikolo konatiĝi kun tiu sveda verkisto kaj kun lia ĉefverko.*


Harry Martinsson, sveda verkisto kaj Nobelpremiito pri literaturo, komencis sian vivon sub tre malgajaj kaj malfacilaj kondiĉoj. Li naskiĝis en 1904 en la sudsveda provinco Blekinge. Lia patro, kiu estis unue ŝipestro kaj poste komercisto, malofte estis hejme kaj mortis jam en la unuaj vivojaroj de la filo. Tiam la patrino ne plu kapablis vivteni la infanojn kaj elmigris al Usono. Harry kaj liaj gefratoj estis aŭkcie venditaj al tiuj homoj, kiuj proponis la plej altajn monsumojn. De tempo al tempo li vivis en maljunulejo. Li ĉiam sentis, ke li ne estas dezirata kaj bonvena, sed feliĉe li komprenis ĉerpi konsolon el legado de libroj kaj poste la lernejo estiĝis por li hela medio meze de la mallumo.

La maltrankvila temperamento de la juna Martinson respeguliĝas en liaj variaj okupoj. Li laboris sur torfkampo, li striglis ĉevalojn en bieneto, li senlabore ĉirkaŭvagadis kaj dum kelkaj jaroj li estis maristo, sed maldungiĝis en la sama tago, kiam li atingis dudek tri jarojn. Tiam li jam dum longaj periodoj restadis en Brazilo kaj Hindujo.

La dekonujara edzeco kun Moa havis decidigan signifon por lia transiro al plentempa verkado — jam pli frue ŝi sendis al li la libron "Sep maroj" de Kipling, kiu vekis kaj stimulis lian dormantan talenton. "Komence mi kelkfoje skribis sur malnovajn papersaketojn, dum mi plurajn monatojn devis atendadi novan maristlaboron. Nek la unua nek la dua havis grandan signifon, kiel mi skribis aŭ kie mi skribis. En luĉambro de marista hejmo mi sidis

apud la radiadilo kaj detalumis kelkajn versojn, tute simple."

La titolo de la debutlibro estis "Fantomŝipoj" (Spökskepp, 1929) kaj ĝi enhavis poemojn kun temoj el al marista vivo, sed la kruda realo ofte koloriĝis de lia imagemo. "Marbirdoj estas niaj pensoj kaj ili ĉiam forflugas; kaj ni sidas en la ŝipkantino ĉe Cape Code, fulgaj, ŝvitantaj — kaj la viandsupo je mia animo estas sufiĉe aĉa..."



Kune kun kvar kolegoj Martinson publikigis antologion sub la titolo "Kvin junuloj" (Fem unga), kies komuna karaktero estas forta vivodoro, libera dinamika lingva formo, nekatenita de rimado kaj versmezuro, kaj naiva optimismo. Post ankoraŭ du poemaroj Martinson atingis veran laŭdon per du libroj kun memoroj el siaj maristaj jaroj: "Sencelaj vojaĝoj" (Resor utan mål) kaj "Kabo Adiaŭ" (Kap Farväl). El ili ŝprucas lia asociada kapablo: ĉu temas pri kortuŝaj sociaj priskriboj aŭ pri bonhumoraj ekzemploj de lia ludemo, ĉio prezentata en fajreranta lingva vesto kun surprizaj vortaj novkreadoj kaj kuraĝaj metaforoj. Tiuj rapidaj vojaĝskizoj estis tute novspecaj por svedaj legantoj kaj ĝis nun ne havas egalajon en sveda beletro.

En du aŭtobiografiaj libroj — "La urtikoj floras"

(Nässlorna blomma) kaj "La vojo eksteren" (Vägen ut) — Martinson rakontas pri siaj propraj infan- kaj junuljaroj. Ilin karakterizas multe da krueleco kaj senkompateco kaj nur kelkiam ekbriloj de homa kompreno; li tamen posedis bonan defendilon en sia forta fantazio. En sia imago li eltrovas la "fluglianon", ŝnuro kun hoko, per kiu li sin svingas tra la arbaroj de branĉo al branĉo.

Multaj literaturkritikistoj komparis Harry Martinson kun la fama sveda natursciencisto Carl von Linné, kaj la simileco inter ili precipe montriĝas en vico de libroj kun neordinare akraj observaĵoj pri la naturo: liaj okuloj ŝajnas vidi pli klare kaj registri pli rapide ol eĉ

fotilo. Al la naturo apartenas ankaŭ la ondoj de la maro kaj la ventoj — li dediĉis tutan poemlibron al la tradoventoj, kiujn li preferis al senvento aŭ uragano.

En la jaro 1948 aperis "La vojo al Klockrike" (Vägen till Klockrike), kiu temas pri la vagisto Bolle kaj lia migrado en la sveda kamparo ĉe la fino de la deknaŭa jarcento. Kelkaj, sed nur malmultaj, kavaliroj de la vojoj estas krimaj; aliaj estas nelaboremaj obstinuloj, sed plej proksime al la koro de la aŭtoro staras tria kategorio, nome tiuj, kiujn instigas pura amo al liberco kaj sopiro al novaj medioj.

Grandan atenton vekis "Aniara" (Aniara, 1956), grandioza versa epopeo en pli ol cent kantoj, pri spacŝipo, "goldondo", kiu dum sia vojaĝo al la planedo Marso kun 6 000 elmigrantoj de la Tero deviiĝas kaj flugas al la konstelacio Liro, lokita

tre malproksime en la senfinaj spacoj. Efektive temas pri la nuntempa homaro, kiu vivas kvazaŭ forlasita en spaca dezerto, ĉar ĝia planedo fariĝis preskaŭ nelegebla kaŭze de gravaj radioaktivaj difektoj. La ŝipon direktas teknike lertaj, sed nepersonaj pilotoj, kelkaj pasaĝeroj adoras ĉiajn diojn, dum aliaj amuziĝas per dancado kaj aliaj distraĵoj. Multaj kolektiĝas ĉirkaŭ la "Mimo", globo, en kies profundo troviĝas bildoj el ĉiuj epokoj kaj regionoj en la senlima universo, sed kiu samtempe estas mirakla instrumento por informado kaj orientado.

Kiam la malproksima hejmplano, la Tero, diskriviĝas, la doloro de la "Mimo" fariĝas netolerebla; en la deknaŭa kanto ankaŭ ĝi eksplodas. Sed la "goldondo" daŭre ĵetiĝas tra la jaroj kaj la spaco, la kapablo de orientado perdiĝas, sed la rakonto pluiras. La enfermitaj homoj ankoraŭ vivas, sopiras, esperas — iliaj memoroj kaj songoj transformiĝas al bela poezio.

Unu el la multaj biografistoj de Harry Martinson skribas jene: "Aniara estas verko, en kiu Martinson sukcesis esprimi sian tutan riĉegan personecon. Tie ĉi kuniĝas la sono pri fuĝo kaj la hejmsopiro. Tie ĉi vivas nebridebla sciemo, fantaziaĵoj,igitaj de logiko, imponiga amatora kono pri fiziko kaj astronomio, potenca ĉiosento, kiu kelkfoje povus esti nomata kosma pieco, humana patoso, eksterordinare subtila sento por la naturo kaj ridetanta ŝercemo. Kaj sub kaj malantaŭ ĉio kreskanta angoro pro la rezultoj de la homa eksperimentemo, mordetanta nigra timo, ke ni sukcesis kapti sekretojn, kiujn ni ne kapablas regi kaj kiuj iutage signifos la komunan pereon de la homaro. — Per Aniara Harry Martinson dank' al sia speciala talento — fantazio same altgrade de ingeniero kaj de poeto — fariĝis la bardo antaŭ ĉiuj aliaj de la atomepoko."

Harry Martinson fariĝis membro de la Sveda akademio en 1949, ricevis la Nobelpremion (kune kun la sveda verkisto Eyvind Johnson) en 1974 kaj mortis en februaro 1978. La esperanta traduko de Aniara aperis en 1979.

Karl Söderberg

## Gazetaro & lingvo temo de semajnfino

La energia Suda distrikto de SEF aranĝis la 15an kaj 16an de marto bone vizitatan kurson en Helsingborg. La temo estis kontakto kun amaskomunikiloj kaj lingvoekzercado, du sufiĉe gravaj temoj por ni esperantistoj.

La bonajn konsilojn, kiel ni plej bone ekhavu kontakton kun ĵurnalistoj kaj ĉiutagaj gazetoj donis al ni ĵurnalistino Bodil Brandonné, kiu finis la "lecionon" donante al ni taskon skribi artikolon pri la ĉijara Universala Kongreso. Pri ĝi donis jam pli frue kelkajn informojn la prezidanto de la distrikto, Olle Olsson.

Post la kafopaŭzo ni grupe laboris kaj skribis tian artikolon. La raportado de la diversaj grupoj kaŭzis vigran diskuton.

Sekvis kontribuado de sinjorino Zofia Banet-Fornalowa el Wrocław, Pollando, al kiu Karin Strandberg, la ĉefmotoro de la kursarango, donis la taskon paroli pri: Kiel rapide refreŝigi siajn esperantosojn. La interesoplena prezento rezultigis intensan kaj fruktodonan gruplaboron.

Post abunda kaj bongusta tagmanĝo kun delikata glaciaĵo kaj kafo Zofia prelegis pri Varsovio kaj montris bildojn. Per tio la serioza parto de la programo sabata finiĝis kaj sekvis amuza kunestado kun danco, aŭ havena promeno.

La dimanĉa programo komenciĝis per matenmanĝo, kiun sekvis vigla gruplaboro. Laŭ ĉies opinio laboro en malgrandaj grupoj estas tre valora, ĉar oni tie senĝene povas kaj devas helpi kaj korekti sin reciproke. Sekvis jarkunveno de la suda distrikto, pri kiu vi povas legi aliloke.

Kiel lasta punkto de la dimanĉa programo Zofia rakontis pri polaj kulturo kaj lernejo, kaj pri rilatoj inter Pollando kaj Svedujo dum pasintaj tempoj. Estas neeble, laŭ ŝi, dum unu horo prilumi tiel vastan temon, sed ŝi tamen volis doni al ni kelkajn informerojn.

Pollando longe suferis sub fremda regado, sed ĉiam

la poloj sukcesis reteni sian polecon. En la deksesa jarcento la baroka arkitekturo riĉe evoluiĝis en la lando. De proksimume 1800 kaj ĝis post la unua mondmilito Pollando estis dividita inter Ruslando, Aŭstrio kaj Pruslando. La dudek jaroj inter la du mondmilitoj estis tre gravaj pro Pollando. Tiam ĝi faris rimarkindajn antaŭenpaŝojn. Dum la lasta mondmilito la lando terure suferis kaj milionoj da homoj estis mortigitaj. En la lando kaj precipe en la ĉefurbo ĉio estis detruita.

Post la milito oni forte laboregis por rekonstrui la landon. Precipe en la malnova parto de Varsovio oni faris unikan laboron inter la urbaj ruinoj. La malnova urbo denove havas la saman aspekton kiel antaŭ la mondmilito. Nils Olsson

— SUDA DISTRIKTO —

## Informado & kursoj en suda jarraporto

Post la komencaj salutoj de Inga Magnusson, prezidantino de la klubo de Helsingborg kaj letera saluto de s-ro Josef Vitek oni komencis per la jarkunvenaj tagordaj punktoj.

Olle Olsson estis elektita prezidanto de la jarkunveno.

El la jarraporto evidentiĝis, ke la laboro dum la pasinta jaro estis sufiĉe bona. Kursoj por komencantoj estis aranĝitaj en Ljungby, Malmö kaj Trelleborg, kaj por progresintoj en sep urboj distriktaĵaj. Kurso por studgvidantoj okazis en Malmö. Junulara sekcio ekzistas en Lund. La klubo en Lund krome aranĝis ion dum la vintrosporta semajno lerneja. Pri la agadoj de la kluboj estis raportita informado pri esperanto en Halmstad kaj Ljungby kaj publika informado en Malmö kaj Lund. Membroj de la studenta klubo en Lund kunlaboris ĉe la informar-

## Aktiva agado de 50-jara esp-klubo

En Gotenburgo laboras diversaj esperantosocietoj kaj tie troviĝas ankaŭ la grupo *Inter* de Lennart Åberg, kiu multon faras sen esti societo en la kutima senco de la vorto, kaj sen apogo de aparta organizaĵo.

Inter la esperantosocietoj de Gotenburgo ŝajnas, tamen, ke la Esperantosocieto de Gotenburgo estas momente la plej aktiva. Ili havas permanentajn ejojn en Göteborgs Arbetarinstitut, tradicia konstruaĵo ĉe Magasinsgatan, en la vera centro de Gotenburgo. La domo estas nun posedaĵo de la urbo kaj centro por diversaj aktivecoj, precipe internaciaj.

La Esperantosocieto de Gotenburgo festis en decembro la 50-jaran datrevenon de sia ekzisto kun solena kunveno en la festsalono de

la instituto. Memorinda dimanĉa posttagmezo kun kantoj de la eminenta kantistino Elisabeth Lindgren kaj dancoj de la internacia popoldanca grupo de Gotenburgo. Plej memorinda eble estas prezentado de ekstrakto el la historio de la societo, kiun faris Wilhelm Anjou, unu el la pioniroj. Je tiu jubileo jam malsana li prezentis brilan paroladon, eĉ se kun granda peno. Kelkajn semajnojn pli poste li forpasis.

La jarraporto atestas pri aktiva agado: ili havas du studrondojn kaj inter la komencantoj estas multaj gejunuloj. Multaj el la lanoj fidele laboras, sed apartan honoron meritas la prezidanto, Erik Johansson.

Åke Blomberg

man kunvenon en Malmö.

La ĉiujara renkontiĝo kun la danaj esperantistoj okazis pasintaŭtune en Skanör-Falsterbo.

Post elektoj la distrikta estraro konsistas nun el Olle Olsson, Lund, Gertrud Lund, Malmö, Lisbet Andreasson, Hörby, Martin Sätther, Lund, Ove Krantz, Malmö, Karin Strandberg, Lund kaj Sven Jernby, Helsingborg, kun Sören Sandqvist, Hästveda, Gösta Ljunggren, Malmö, Malte Smith, Kävlinge, kaj Sven Strandberg, Lund, kiel anstataŭantoj.

Ester Andrén


### MONATO

internacia magazino sendependa

3/80

11 marto 1980

#### Nova vetarmado?



## MONATO

internacia magazino sendependa

«La apero de MONATO estas la plej grava kultura evento dum la lastaj jardekoj.»

Aŭtentika eldiro de abonanto

Petu provnumeron ĉe la eldonejo: TK/Stafeto, Heideweg 20, B-2120 Schoten.

# Printemposento

[Varkänning]

Mi konas la araneajn  
surkanajn retojn ĉe akvo,  
la arbarojn erike florplenajn,  
kie treme l' aŭror' malhelas.  
Kaj mi nombris la rojajn digojn  
el branĉoj betulaj, brunflavaj,  
krucforme ĵetitaj de l' vento —  
kaj mi vidis la junajn lutrojn  
en malklaraj rojondoj ĉasadi  
sub herbtufoj balanciĝantaj  
kaj luliĝanta flavgrund'.  
De l' obskur' mi sentis l' obskuron,  
vivanta en ĝuo, sufero,  
sub la kovra herboplektaĵo,  
ĝi krablas, ŝoviĝas kaj rampas  
kaj kaptas, mortigas kaj manĝas  
kaj naskas kaj mortas por vivi  
revive en tempoj venontaj ...  
Mi konas la vojojn de l' akvo,  
kie rojoj murmuris novnaske  
sub la muskoarbaroj humiĝaj,  
sub ondantaj arbkronoj vivplenaj  
je blanko, brunnigro, krurhasto  
flugonta per plumoj kreskantaj  
sundancen en monta printemp'.  
Ekfajfas la sturn' sen timo,  
rapidas la vulp' tra l' erik',  
lepor' saltas, ĉasviktimo —  
premiĝas sub ŝu' lumbrik'.  
Min ekvekis vivobruo —  
nun min tenas printempoĝuo,  
eĉ malsato min kanti instigas,  
dum gutas de l' alnoburĝon',  
min printempo ebria igas,  
mi pluiras vagul' sen mon'.

Vortoj: Dan Andersson  
Muziko: Sven Scholander  
Tradukis: Franko Luin

(Rojo estas rivereto)

# TABULO

"Tabulo" estas nova angulo en *La Espero*, en kiu povas aperi anoncetoj kaj memorigoj pri ĉio ajn. Via anonco aperos, kiam estos loko sur la "tabulo".

Dora Jankova,  
str. Kiril i Metodij  
22 K 3, BG-5400  
Sevlievo, Bulgario,  
kaj Bärbel Kulisch,  
Langer Grund 46,  
DDR-12 Frankfurt-  
an-der-Oder, GDR,  
ambaŭ 27-jaraj, volas  
prefere korespondi  
kun samaĝa sveda familio.

Proksimume 50 komencantoj  
gejunuloj, studentoj, instru-  
istoj kaj aliaj profesioj,  
kiuj diligente studis  
esperanton dum la vintro,  
serĉas amase da leteramikoj.  
Bonvolu skribi al la kursgvidant-  
ino: Franciska Harmsen,  
Rinka iela 25,  
SU-229705 Liepaja,  
Latvia SSR, Sovetunio.

Helpu al Anna Matová lerni iom de la sveda lingvo!  
46-jara, laboranta en biblioteko, ŝi tre interesiĝas pri  
ĉio sveda. Kaj ne faru kiel tiu, kiu jam respondis al ŝi,  
sed poste ne reskribis. La adreso: Anna Matová, Visnová ul. c. 626,  
Liberec 14-Ruprechlice, 460 14 Ĉeĥoslovakio.

21-jaraĝa kaj esperantisto de tri  
jaroj serĉas korespondamikojn.  
Interesiĝas pri bildkartoj, reklam  
afiŝoj, muziko, papilioj ktp.  
Virino, kiu interesiĝas  
pri akordeonistoj — jen kore-  
pondanto por vi. 38-jara ĝarden-  
teknikisto Johano Mezey,  
H-1078 Budapeŝto, Hernád u. 27,  
II.22, Hungario.

Roland Schindler, DDR-209 Templin,  
Wilhelm-Pieck-Str. 44, GDR.

Diplomita agraringenierino, 26-jara,  
deziras korespondi kun gekolegoj. Interesiĝas pri literaturo,  
historio, belartoj kaj ŝatas vojaĝi. Annemarie Drüschler,  
DDR-8020 Dresden, Heinrich-Zille-Strasse 4, GDR.

Stanislaw Staszewski, ul. Daszyńskiego 22 A / m 31,  
PL-95-070 Aleksandrów, Pollando, kiu  
laboras en la Lodza Politekniko, serĉas korespondamikojn,  
kiujn li volonte vizitus kaj mem gastigus. Skribu al li!

En la orienta parto de Svedio  
sude de Stokholmo kaj norde de  
Uppsala, escepte de Sundsvall kaj  
Kramfors, Pasporta Servo  
serĉas gastigantojn por 1981  
(ekz. en Norrköping, Kalmar, Gotland,  
Söderhamn). Sendu vian aliĝilon al:  
Wim Posthuma, Soldatg. 40, 72345  
Västerås.

20-jara hispano, militrezistanto,  
ŝatus korespondi pri temoj:  
nuntempa vivo, verkistoj, arto.  
Joan Ráfols i Vendrell, Rovira 14,  
Sant Pau d'Ordal, Barcelona, hisp.

Eduardo Inurrigarro havis en 1934  
korespondanton en Västerås. Promi-  
lito, jaroj en malliberejo kaj longaj  
labortagoj li devis ĉesi okupiĝi  
pri esperanto. Sed nun li denove gvidas  
kurson kaj serĉas amikojn en Svedio.  
Lia adreso: c/ Lloret, 76-1-2, Barcelona-31,  
Hispanio.

Havigu korespondantinon en Alasko!  
Instruistino malpli ol 30-jara, kun edzo,  
interesiĝanta pri teksaĵoj k.s.  
atendas leterojn. Eileen Clark, Gustavus,  
Alaska 99826, Usono.

17-jara knabo el Vrbovec, kiu estas  
urbeto kun 5000 enloĝantoj en Jugoslavio,  
atendas leterojn kaj poŝtmarkojn.  
La adreso: Zdravko Benedik, Savska cesta 12,  
YU-43216 Vrbovec, Jugoslavio.

Nova rondo kun junaj homoj serĉas  
plurajn korespondantojn kun plej diversaj  
interesiĝoj. Skribu pri viaj.  
Kolo "Esperanto", BPPL "Bedete",  
Lodź, plac Zwyciestwa 2, Pollando.

## Tidtabellen till Hallsberg

Går du och undrar fortfarande hur du ska tolka tidtabellen om tågtider till och från Hallsberg som finns i förra numret av *La Espero*? Här får du förklaringen:

Du kan resa från Stockholm 08.08 och är då framme i Hallsberg 10.04. Motsvarande gäller för andra orter.

När du ska hem läser du tabellen så här: du åker från Hallsberg 13.54 och är framme i Stockholm 15.50. Så enkelt var det!

## Uppsvinget i Iran fortsätter

Vad som händer i Iran har inte påverkat esperantouppsvinget negativt. Roland Lindblom fick i februari ett brev från en esperantovän därifrån, en ingenjör med namnet Aref Azari.

Azari ombads i höstas att leda en esperantokurs för tio professorer vid universitetet, där det pågått frivillig undervisning i esperanto i fyra år. Nu skriver han att han fått åta sig ytterligare två kurser: en vid ett flickläroverk och en vid en handelshögskola.

Förutom att leda kurser går han själv som elev i "högre kurs".

Esperanto är med vid universitetet i Teheran som enda fritt valbara språk. Esperantointresset ökar starkt. Just nu pågår 40 olika esperantokurser enbart i Teheran och efter hand som man får fram nya lärare blir det fler kurser.

Tidskriften *esperanto* kan berätta, att intresset för esperanto tar ibland lite olustiga uttryck. Vid några skolor bojkottar eleverna engelskundervisningen och råder sina lärare att lära sig esperanto och ge lektioner i det språket i stället.

## Kreskanta vendado ĉe Eldona Societo

Eldona Societo Esperanto prezentis sian jarraporton por 1979.

La vendado kreskis per 29% ĝis 60 673 kr. La eldono de *Aniara* de Harry Martinson kontribuis al la kresko (ĝis la fino de la jaro vendi-

# JES & NE

gis 250 ekzempleroj), sed ankaŭ speciala kampanjo ĉe la publikaj bibliotekoj de Svedio.

Malgraŭ la altiĝo de la vendado la rezulto montras deficiton de 11 368 kr, ĉefe pro pli altaj kostoj de ekspedado kaj la kompostejo en Stokholmo. La financa situacio de la eldonejo estas tamen ankoraŭ kontentiga, sed ĉar ni estas ligitaj al eldono de nova svedesperanta vortaro, ni devas esti tre singardaj pri iu ajn noveldonaĵo, kiu ligas kapitalon.

La kompostado de la vortaro malmulte progresis dum la jaro, ĉefe ĉar mankas kapablaj personoj por la laboro. Ni esperas tamen solvi tiun problemon dum 1980, tiel ke la laboro progresu kaj la vortaro fine aperu.

Inter aliaj novaj projektoj menciindaj estas nova legolibro por progresantoj, jam kompostita, kiu espereble aperos en bona tempo antaŭ la nova studsezono 1980/81. Pretiĝas ankaŭ traduko de *Röde Orm*, eminenta verko el la klasika sveda literaturo, kiun ni sentas devon eldoni.

Åke Blomberg

## Poŝto informas pri esperanto

Kiam ni esperantistoj devas per malmultaj vortoj prezenti esperanton skribe, ni kelkfoje sukcesas bone, aliajn fojojn malpli bone. Kiel tio sukcesas, kiam neesperantisto faras la prezenton?

Se ni juĝu laŭ la paĝo, kiun la poŝta administracio dediĉis al esperanto en la speciala broŝuro *Skaffa dig*

*Under kongressveckan kommer att anordnas en "Introduktion till dagens esperanto" för språkvettare, språksociologer och liknande. Om du känner till några som man borde skicka en inbjudan till, sänd deras adress till Esperantokongressen, Box 4009, 122 04 Stockholm-Enskede.*

en brevvän (Havigu leteramikon), kiu turnas sin al junaj homoj kaj estas havebla en ĉiuj poŝtofficejoj, fakte bone.

Unu paĝo el dek ses supozeble estas bona rezulto. La broŝuro cetere faras sufiĉe malkaŝe propagandon por la angla. Verŝajne iu en la redakcio opiniis, ke oni devas iom balanci tiun troanglecon. Ni dankas pro la ĝentila ago. Tiu broŝuro certe atingos pli da junaj homoj ol farus ia ajn nia kampanjo. Krom tio ĝi kostas al ni nek laboron nek monon. Bedaŭrinde estas nur, ke mankas en la broŝuro la adreso de SEF aŭ SEJU. Ekzistas ja adreso al Koresponda Servo Mondskala de UEA ... Almenaŭ io.

## Ne plu estas inter ni

La klubo de Örebro perdis en januaro kaj februaro du siajn membrojn, nome Gösta Eriksson kaj Ebba Dahlberg. Ambaŭ estis multjaraj membroj de la klubo.

En Gotenburgo mortis la 26an de februaro Wilhelm Anjou, 70-jara. Kiel komercisto li sin dediĉis al ĝardenista okupado de post 1937. Dum pluraj jaroj li prezidis la Federacion de Sveda Ĝardenjunularo.

Li funkciis kiel vojaĝarantaĝanto por SEF kaj havis multajn funkciojn en la loka esperantomovado.

En Kumla forpasis, 67-jara, **Tage Goldheim**, ĉefkontisto ĉe la ŝuentreprenejo Jonsson&Kjellin kaj poste kasisto ĉe la komunumo.

Li multe kontribuis al la kultura vivo de Kumla (i a kiel gvidanto de teatraj grupoj). Li estis tre aktiva en la popolklerigaj organizaĵoj. En la esperantoklubo li estis dum multaj jaroj sekretario.

Al ĉiuj parencoj ni sendas niajn kondolencojn.

## Prelegoj pri pola pedagogo

Lennart Åberg kaj lia grupo *Inter* preparas prelegkampanjon en la lernejoj de la regiono de Gotenburgo. La aranĝo estas kunlabore kun la UN-klubo de Gotenburgo. La prelego temas pri Janusz Korczak, la pola kuracisto, pedagogo kaj verkisto, kiu dediĉis sian vivon al la infanoj kaj finis ĝin en gasĉambro en Treblinka.

La prelegojn faras s-ino Zofia Banet-Fornalowa, jam konata al pluraj el ni pro sia partopreno en diversaj kluboj kaj semajnfinaĵ aranĝoj.

Ni estas certaj, ke la prelegserio bone sukcesos. Nur ion ni bedaŭras: ke oni tiel efike kaŝas, ke temas pri prelegoj en esperanto. Nenio en la sendita materialo mencias, ke temas pri aranĝo de esperantistoj.

## Propra emblemo por la infanoj

La infana kongreseto, pri kiu *La Espero* skribas sur la unua paĝo, havos propran emblemon kaj ĝi aspektas jene:



La infanoj havos ĝin sur sia nomŝildo, sed ankaŭ sur speciala ĉapo, kiu estos ilia "uniformo". Eventuale tiu ĉapo estos acetebila ankaŭ de aliaj, ekzemple de kolektantoj de esperantaĵoj.

